peranto-Förbundet
peranto-Federacio
698, Stockholm 1

Ur almanack 1933.
Sid.32-33.

Esperanto.

Vane restos demandi, kiel sin formus la sorto de Svedlando, se al Gustavo Adolfo estus donita pli longa vivo.

Detranĉita jam frutempe lia kariero tamen sukcesis kunporti radikalan ŝanĝon en la eksteraj potenckondiĉoj de la sveda ŝtato.

Kaj eĉ se oni konsideras dece ignori tion, eĉ se lia laŭro de militisto kaj konkeranto trovigus velkinta: neniam oni povos malgraŭ tio nei, ke Gustavo Adolfo apartenas al la vere grandaj novorganizantoj - verŝajne, se oni povus konduki la komparon al konkludo, kun la rajto okupi la plej eminentan lokon en nia historio ankaŭ kiel konkeranto sur la kampo de paco.

La famaj vortoj pri "La eklezio de Dio kaj la majesto de la patrolando en ĝi ripozanta" montras al la ideaj potencoj, kiujn tiu senripoza realpolitikisto ĉiam konscia pri sia celo faris sian mision servi.